

LA INFERO EKZISTAS

Pensoj de s-ta Petro Juliano Eymard, fondinto de la ordeno de eŭkaristianoj

La plej grandaj sanktuloj opiniis mediton pri la infero tre bonfara kaj aperadis en ĝi diversajn instigojn al ĉiam pli granda amo al Savinto. Estas vere, ke la amo kreas sanktecon, sed ne malofte estas timosento utila, ja eĉ rekte necesega.

La vero pri la ekzisto de la infero estas sendube teruriga kaj malfacile oni ĝin kredas. Tamen ĉiuj je ĝi kredas: nekredantoj, paganoj, Turkoj kaj herezuloj same kiel katolikoj. Tamen la nekredantojn kaj ĉiujn, ĉe kiuj la kredo ne estas firma, tiu ĉi vero terurigas, kaj se ĝin al ili iu volas pruvi, ili blasfemas Dion.

La infero efikas kurace nur je tiuj, kiuj amas Dion. Kiel povas Dio siajn kreitulojn, kiujn Li kreis kun tiel granda amo, kondamni al eterna infera puno? Post la morto ĉesas Dia mizerikordo al ni. Elektitaj estas, laŭ vortoj de la Savinto, malmultaj. La vojojn, kondukantan al la ĉielo, trovas nur malmultaj homoj, dum la multaj iras la vojojn de la perejo. Tio estas eksplicita instruo de la evangelio. Ĉu povas do la senlime bona Dio tiom da homojn damni poreterne? Ja ekzistas homoj, kiuj eĉ ne plej grandan krimulon volas kondamni al mortpuno!

Por la animoj, kiuj en momento de la morto havas negravajn pekojn, la Dia mizerikordo daŭras eĉ en eterneco. Por damnitaj ne plu ekzistas mizerikordo. Dio kaj Sinjoro ilin vanigos. Kaj ĉu ne ekzistas eĉ tiuj, kiuj vivis sanktan vivon kaj antaŭenpaŝos la juĝon kun ununura mortiga peko? Eĉ tiuj estas poreterne damnitaj! La eterna puno, la eterna disiĝo de Dio, kiel timega ekspeno! Eterna malespero, honto, turmento! Tial ni komprenas, ke troviĝis scienculoj, kiuj asertis, ke la infero ne povas ekzisti eterne, ĉar tio kontraŭstaras al senfina Dia boneco. Tiun ĉi instruon la eklezio rifuzis kiel herezon. Sed facile oni povas kompreni, kial ĝi trovis tiom da adeptoj. La eternan inferan punon ni ja timegas. En la infero ekzistos eterna

malespero, eterna ploro kaj dentogrincado.⁽³⁾ Surtere estas la plej terura malespero, kontraŭ kiu nin povas ŝirmi specifa graco. Kiu ne havas kredon, antaŭ malespero preferas morton kaj eltiras sin el ĝi per tio, ke li mem ĉesigas sian vivon. Tio jam en la infero ne estas ebla, tie oni vivas en konstanta morteca angoro kaj malespero, sen unusola radio de espero kaj konsolo.

Mi devas ĉi tie rakonti okazaĵon, kiun mi havas en viva memoro kaj kiu al ni ebligas imagi tiun doloron de la malespero:

En la jaro 1852 oni alkondukis al mi obseditan homon, kiu antaŭe neniam estis bona kristano. Malbona malamiko parolis per lia buŝo kaj li blasfemis Dion pro senfina daŭro de sia puno. Unu sacerdoto la malbonulon demandis: „Kiujn kondiĉojn vi akceptus, se al vi post miliono de tagoj ekbrilus radio de la espero?“ Al tio demono respondis, kiu pri si asertis, ke li estas estinta serafo Astarot, kaj sur lia vizaĝo estis videbla granda helo, per kolerega voĉo: „Se el la infero al la ĉielo ekzistus kolono el nuraj ponardoj kaj akraj glavoj, ni la damnitaj volonte sur ĝi ascendus dum miliono de jaroj por ununura minuto de la espero. Sed vana ĝi estas.“ Poste li furiozis kaj blasfemis kontraŭ Dio: „Kial Dio rilate al ni estas tiel maljusta! Homoj pli multe pekis ol ni ĉiutage. Ni faris nur unu pekon. Al homoj Dio pardonas, dum ni devas senti tutan pezon de la Dia justeco.“ Poste la malfeliĉulo ŝiregis siajn harojn kaj li sin mortigus, se ne estus al li tio malebligita.

Ni rigardu la riĉan festenulon en la infero. Li petas Abrahamon pri unu guto da akvo, por malvarmigi ardantan langon. Tio ne estas ebla, ĉar „staras granda abismo inter ni kaj vi. Dum via vivo vi ricevis viajn bonaĵojn, nun vi rajte suferas.“ Aŭskultu tiujn vortojn: Tiu riĉulo faris neniun grandan krimagon, por ke lin la monda justeco devus puni. Nur li treege ĝuadis la surterajn bonaĵojn. Kaj tamen li estas poreterne damnita!

La plej granda sufero en la infero estas morala doloro, en memoro, en imagemo, en racio. Kiel devas suferi tiuj, kiuj kiel pia pastro Saprise travivis plejparton de la vivo sanktece, sed poste ne persistis ĝis la fino? – Tiuj ĉi damnitoj devas suferi plej multe. Ili amis Dion, tiel facile ili povis persisti en lia servo. Nun ili tion vidas. Antaŭe ili jam havis saporon de la eterna feliĉeco, nun ili estas damnitaj. Mi diras poreterne, ĉar laŭ vortoj de saĝulo estas tri abismoj, kiujn ne eblas pleni: monavideco, infero kaj morto. Tial ni laboras por nia savo kun timosento kaj tremo. Ho, certe en la infero estas homoj, kiuj pekis pli malmulte ol mi. Al Dia boneco mi devas danki, ke mi ankoraŭ ne estis damnita. Se Dio min damnus, ne okazus al mi maljusteco kaj neniam mi povus objeti kontraŭ tiu verdikto; ununura el miaj mortigaj pekoj transdonis Savinton al la morto. Mi do estas ankaŭ lia ekzekutisto. En la infero estas sendube homoj, kiuj surtere estis imagataj kiel sanktuloj, inter ili ankaŭ pastroj kaj geordenanoj. Ĉu tio ne povus okazis ankaŭ al mi?

Ĉu mi persistos en la servo de Dio ĝis fino de mia vivo? Tio estas tre grava demando. Malbonŝance ni tre malmulte timas peki, kaj kiam ni ĝin faris, ni ne havas kuraĝon konvene ĝin pacigi. Ni diras al ni: Mi pekkonfesos, ĝis kiam mi malsaniĝos, mi vekos en mi senmankan penton, kaj tiel mi certigos por mi eternan savon de la animo. Sed ĉu ni forgesis, ke la morto venas kvazaŭ ŝtelisto nokte vanigante niajn intencojn?

Kiu estas ŝirmata kontraŭ la grava peko? Kiu scias, ĉu li ĉiam brave konfesos sian kredon? Kiu scias: „ĉu li indas amon, aŭ malamon“? Tiu ĉi penso timegigis eĉ la sanktan Bernardon. Tial ni volas konstante uzadi efikajn rimedojn de la savo kaj ne tro konstrui sur siaj deziroj kaj decidoj, ĉar se temas pri eterneco, neniam ni povas esti certaj. Ĉu mi ne estas survoje al la morteca peko? Tial bone ekzameni vian konsciencon, eĉ se temas pri negravaj pekoj, kiuj estas malgrandaj insidoj, kiuj nin povas tiri en

abismon; ni povas finiĝi kiel Samson, kiun ruza Dalila entiris en pereon.

Estas kelkaj negravaj pekoj, kiuj homon alkondukos al la peko morteca. Apartenas al tio pekoj de malĉasteco: Kiel instruas sankta Alfonso, en la infero estas eĉ ne unu homo, kiu ne estus damnita pro malĉasteco. Plue ĉi tien apartenas pekoj de spirita fiereco, kiuj plej ofte kondukas al apostateco. Se eĉ ne ekpenso pri la infero, eĉ ne konsidero pri la eterna amo de Dio ne sufiĉas al homo por konvertiĝo, poste li estas senrevene perdita. Nur ni ne diru: „Mi vivas en proksimeco de eŭkaristia Savinto. Kion do mi timu?“

Judas ankaŭ vivis en societo de la Savinto. „Sed mi Dion amas.“ Judaso ja ankaŭ komence amis la Savinton, sed malfavoreco iom-post-iome sufokis lian amon kaj igis lin perfidulo. El du krimuloj flanke de la Savinto estis nur unu savita, la dua kondamnita. Kiu havas la feliĉon vivi en proksimeco de eŭkaristia Savinto, al tiu estas donita rimedo por la savo. Kiu ĝin ne eluzadas, surmetas sur sin des pli grandan respondecon. Li sekvas forfalintajn anĝelojn: Li falas des pli profunden, ju pli alte li staris, kaj tial li devos toleri la plej teruran suferon.

(Die heilige Eucharistie, Lindau 1898)

El libro Steven Scheier: Averta Atesto

(1) Amanto sin transformiĝas je tio, kion li amas. Sankta Paŭlo, kiu realigis tiun ĉi gradon de la amo, diras: „Jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi.“ (Gal 2,20)

(2) Se iu faris gravan pekon, estas devinta tion tuj pripenti kaj eluzi plej proksiman okazon al pekkonfeso. Se tio ne estas ebla kaj temas pri sacerdoto, li povas peradi sakramentojn, se tion animzorgado postulas, ekz. celebri la dimanĉan sanktan meson por kredantoj. Tiukaze li devas senprokraste fari ekzaktan pentofaron. Sac. Scheier ne nur ne eluzis proksiman eblecon por pekkonfeso, sed ellasis eĉ akton de la ekzakta pento, por inde servi per sakramentoj. ■

(3) Komp. Mat 8,12.